juna amiko

APRILO 2009 N-ro 1/2009 (124)

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE ILEI POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

Azio legende-leginde en Juna amiko 2009/1

La unua numero de *Juna amiko* por 2009 estas aktive preparata. Supre vi vidas la novan titol-strion, kiu inaŭguras novan vicordigon de la materialoj kaj aliajn grafikajn kaj enhavajn novaĵojn.

La numero proponos buntan kaj tutmondan enhavon. Azio forte kontribuis: troveblos fableca legendo el la montega lando Nepalo, anekdotoj el la granda Bharato (Hindio), aventura rakonto pri pli granda Ĉinio (verkita de ĉeĥo kaj sendita de germano) kaj legendo el Vjetnamio. Aldoniĝas tradukoj el Kubo – legendo kaj teatraĵeto. Aperos plie kvizo, la bildstrio pri la aventuroj de la vojaĝantaj instruistoj Emilo kaj Erni, artikolo *Ĉu vi scias ke...* kaj la kutima rubriko pri lernejaj projektoj kaj movadaj eroj (Verda Paĝo kaj Lingva Doktoro). La rubriko por etuloj, LUME, prezentas teatraĵeton kaj ege simplan krucenigmon pri familioj. Humuro figuras en formo de pluraj ŝercoj, kaj en amuzaj poemo kaj skeĉo pri la frezeniga flanko de ret-babilado. En la mezaj paĝoj ni esploras ideojn kiujn oni povas ligi al la koloro verda.

Perantoj en trideko da landoj akceptas abonojn: nun estas la ĝusta momento por agi, por ke vi ricevu la unuan numeron por la jaro en aprilo.

La revuo aperas trifoje jare kun 52-paĝoj. Vizitu <www.junaamiko.inf.hu> aŭ <www.lernu.net> kaj iru al la biblioteko, kie vi trovos nin inter la revuoj.

Jarabono	**1 ekz.**	**Ekde 3 ekz. al unu adreso**
Tarifo 1 (A-landoj ĉe UEA)	€ 14	po € 11
Tarifo 2 (B-landoj ĉe UEA)	€ 9	po € 7